

LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(N.H.) NEDERLANDO
GIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
14 FR.FR.; 0,70 DOL.; 2,15V.FR.

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

VERA HISTORIO.

Iam vivis juna komercisto, Ivan Aksenov. Li loĝis en bela domo, kaj estis posedanto de du butikoj. Kun siaj blondaj haroj kaj aŝfabla mieno li faris al ĉiu agrablan impreson.

En iu bela somera tago Aksenov decidis viziti la foiron en Nisni-Novgorod. Li diris adiaŭ al la edzino kaj la infanoj kaj ekveturis.

Survoje li renkontis alian komerciston, konatan al li. Ili haltis antaŭ sama gastejo por tranokti. Kune ili trinkis teon kaj post tio surpréniris por dormi. La ĉambroj estis tutapudaj sed Aksenov ne bezonis multe dormi. Vekiĝinte meznokte li ellitiĝis kaj decidis eluzi la eksteran malvarmon por daŭrigi sian vojaĝon. Li do iris malsupren, vekis sian veturigiston kaj ordonis al li jungi la ĉevalojn. Post tio li reiris en la malluman gastejon por pagi kaj tiam forveturis.

Veturinte proksimume kvardek verstojn, li haltis antaŭ iu gastejo por nutri la ĉevalojn kaj li mem deziris iom ripozi. Ĉirkaŭ la horo de l'tagmanĝo li mendis iom da teo, eksidis ekstere sur la pordoŝtuparo, ekfumis cigaredon kaj amuzis sin ludante kelkajn melodiojn sur la gitaro.

Post kelka tempo li aŭdas de malproksime tintadon de glitveturilo; ĝi alproksimiĝas pli kaj pli kaj haltas tuj antaŭ la gasteja pordo. Oficisto kaj du soldatoj venas el ĝi kaj paŝas al Aksenov. La oficisto demandas, kiu li estas kaj kien li vojaĝas. Aksenov respondas la demandojn kaj invitas la oficiston al tetrinkado. Sed tiu ĉi daŭrigas la esplordemandadon kaj diras :

„Kie vi dormis en la lasta nokto? Ĉu vi estis sole kun la komercisto en la gastejo? Kaj kial vi forveturis tiom frue?”

Tiu ĉi demandado kaŭzas miron al Aksenov. Li respondas ankaŭ ĉi tiujn demandojn kaj diras fine : „Sed kial ĉi tiuj demandoj? Mi ja ne estas krimulo. Mi estas komercisto kaj vojaĝas pro mia laboro, kaj neniu rajtas en tia maniero esplordemandi min.”

La oficisto faras signon al la soldatoj kaj diras : „ Mi estas poliestro kaj metas ĉi tiujn demandojn antaŭ vin, ĉar en tiu ĉi nokto oni murdis vian kunulon. Vi devas montri al mi viajn pakajojn.” Kaj sin turnante al la soldatoj, li ordonas : „Priserĉu la viron”.

Ĉiuj eniras la gastejon. Oni enportas la kofron kaj la valizon de Aksenov kaj inspektas ĉion tre precize. Subite la poliestro aperigas tranĉilon de el la valizo. „Al kiu ĝi apartenas?” li ekkrias. Aksenov rigardas ĝin kaj rimarkas, ke ĝi estas kovrita per sango-makuloj. Kaj oni trovis ĝin en lia valizo... Li estas rigida pro teruriĝo.

„Kaj kiel la tranĉilo ricevis la makulojn?” daŭrigas la poliestro sian demandadon. Aksenov volas paroli, sed ne eblas eligi eĉ unu vorton. Fine li balbutas : „Mi... mi ne scias. Tiu tranĉilo... ĝi ne estas mia.”

La poliestro daŭrigas : „La komerciston, kun kiu vi estis, oni trovis ĉimatene murdigita en la lito. Neniu krom vi povis fari tion. La gastejo estis fermita de interne kaj nur vi estis tie kun li. Kaj nun ni trovas en via valizo ĉi tiun tranĉilon, tute kun sango kovrita. La krimo estas divenebla eĉ laŭ via mieno. Nu, konfesu senhezite kiel vi murdis lin kaj kiom da mono vi forŝtelis de li.”

Vane Aksenov certigas, ke li scias neniom pri la viro, ke li ne revidis la komerciston post la enlitiĝo, ke la 8000 rubloj, kiujn li portas kun si, estas lia propraĵo, ke la tranĉilo ne estas lia. Li balbutas, li paliĝas, li tremas pro konsterniĝo. Kaj la poliestro ordonas al la soldatoj kateni lin kaj konduki al la glitveturilo.

* * *

Kuŝante tie kun ligitaj manoj kaj piedoj, Aksenov laŭte ekploris.

Lian monon kaj liajn posedaĵojn ili konfiskis kaj lin mem oni kondukis al proksima urbo, kie li estis ĵetata en malliberejon. En lia urbo oni poste faris esploron; la komercistoj kaj la aliaj urbanoj deklaris, ke Aksenov estas bona homo, kvankam li en sia junaĝo kelkfoje malmodere drinkis kaj amuzis sin. Fine li devis veni antaŭ la juĝistaro, kulpigita de murdo al la komercisto Rjazan kaj forrabo de 20.000 rubloj.

La edzino de Aksenov preskaŭ freneziĝis pro ĉagreno. Ŝiaj infanoj estis ankoraŭ tro junaj por kompreni ĉi tiun doloron. Ŝi vojaĝis kun ili al la urbo, kie ŝia edzo estis malliberigita. Komence oni ne permesis al ŝi viziti la edzon, sed post longa petado oni fine allasis ŝin.

Vidante la edzon en mallibereja vestaro, katenita kaj en societo de ĉiuspecaj krimuloj, ŝi svenis kaj daŭris longe antaŭ ol ŝi rekonsciiĝis.

Kiam fine al ŝi la vivo revenis, ŝi metis la infanojn apude sur la plankon. Ŝi kaŭris apud Aksenov, rakontis al li pri la hejmaj okazintaĵoj kaj demandis pri ĉio, kion li travivis.

Kiam li ĉion estis dirinta, la edzino demandis : „Kaj kion ni nun povas fari?”

„Nin turni al la caro,” respondis Aksenov.

„Mi sendis jam petskribon al li,” ŝi diris. „Sed mi timas, ke ĝi ne atingis lin.”

Rompita de ĉagreno Aksenov ne povis respondi.

„Ivan, mia kara Ivan,” time parolis la edzino, „diru la veron al via edzino. Diru, ĉu vi faris la krimon?”

„Do ankaŭ vi supozas tion, ankaŭ vi?” ekkriis Aksenov kaj li kovris sian vizaĝon per la manoj kaj ploris.

En tiu momento sin montris soldato sur la sojlo; li atentigis la edzinon, ke ŝi devas foriri kun la infanoj. Aksenov ĉirkaŭbrakis ilin kaj adiaŭis por la lasta fojo...

Ree estante sola, li ekpensis pri la vortoj de sia edzino. Kaj memorante ke eĉ ŝi dubas pri lia senkulpeco, li diris al si mem : „Nur Dio scias la veron. Nur Lian favoron mi elpetu; mi fidu je lia kompatemo.” Kaj de tiu momento li ne plu forsendis petskribojn; ĉiun esperon li forigis el sia koro kaj nur al Dio li preĝis.

Fine venis la tago, en kiu li rivecis sian verdikton. Li estis kondamnata al skurĝo kaj dumviva punlaboro. La verdikton oni plenumis al li : la skurĝobatojn li ricevis kaj kiam liaj vundoj estis resaniĝintaj, li estis sendata en Siberion.

* * *

Dudek ses jarojn li vivis kiel punlaborulo en Siberio. Liaj haroj blankiĝis kiel neĝo, lia longa barbo estis griza kaj lia iama gajeco estis tute for. Lia dorso kurbiĝis kaj nur pene li povis iri. Malofte li parolis kaj ofte preĝis. En la malliberejo li lernis ŝuflikadon. Per tio li gajnis iom post iom kelkan monon, kaj li aĉetis martirlibron. De temp' al tempo li legis paĝon, kiam estis sufiĉe da lumo en lia ĉelo. Pro sia obeemo li plaĉis al la rusaj oficistoj; liaj kunuloj estimis kaj amis lin kaj ĉiam nomis lin per „aveto” aŭ „dihomo”. Kiam ili volis forsendi petskribon al la registaro aŭ bezonis arbitracianton por siaj malkonsentoj, ili petis lian helpon. De sia hejmo li neniam ricevis sciigon; li ne sciis, ĉu la infanoj kaj la edzino ankoraŭ vivas.

Iutage venis nova sendaĵo da punlaboruloj en la lokon, kie Aksenov estis. La novevenintoj estis tuj eldemandataj, de kie ili estas, kaj pri kio ili krimis. Inter la novuloj estis grizulo, proksimume sesdekjara. Li estis altstatura viro, la barbo estis al li fortondita. Li rakontis pri la motivoj de sia kondamniĝo.

„Komprenu, fratoj, kial mi estas ĉi tie. Sen iu ajn leĝa motivo oni sendis min ĉi tien. Mi maljungis ĉevalon de antaŭ glitveturilo. Tiam ili min kulpigis, ke mi intencas ŝteli la ĉevalon kaj ili arestis min. Nu, iam mi faris krimojn, sed neniam oni sukcesis kapti min en la tikla momento. Do, mi estas neleĝe sendita en Siberion. Sed paciencon. Ili povis ekzili min, sed mi ne longe restos.”

Oni demandis, de kie li estas kaj kiel li nomiĝas. Li diris la saman urbon, kie Aksenov iam loĝis kaj lia nomo estas Makar Semenoviĉ. Aŭdante la urbonomon, Aksenov levis la kapon kaj demandis : „Diru al mi, Makar Semenoviĉ, ĉu en via urbo vi neniam aŭdis pri iu familio Aksenov, komercistoj? Ĉu ankoraŭ ili vivas?”

„Certe mi aŭdis pri tiuj,” estis la respondo. „Ili estas riĉaj komercistoj, sed onidire la patro jam longe vivas en Siberio. Certe li faris kiel ni ian krimon.”

Aksenov ne volonte parolis pri la malfeliĉo, kiu lin trafis. Li nur ĝemis kaj diris : „Pro miaj pekoj mi vivas jam dudek ses jarojn ĉi tie kiel punlaborulo.”

„Kaj pro kiaj pekoj?” demandis Makar Semenoviĉ.

„Mi certe meritis la punon,” diris Aksenov simple. Pli li ne diris pri tio. Sed liaj kamaradoj rakontis al la novuloj pri la kaŭzo de lia kondamniĝo; ke li estis vojaĝanta al la foiro de Niŝni-Novgorod, kaj nekonato murdis komerciston kaj metis la sangon tranĉilon en la valizon de Aksenov, pro kio li estis konsiderata kiel la murdinto kaj senkulpa kondamnata.

Aŭdante ĉi tiun rakonton, Makar Semenoviĉ levis mirigite la kapon. Li alrigardis Aksenov, frapis al si la genuojn per la manoj kaj ekkriis : „Sed tio estas miraklo! Vera miraklo!! Ho, aveto, vi tre maljuniĝis!” Kiam oni al li demandis, kial li tiom miras, kaj kie li antaŭe renkontis Aksenov, li ne donis rektan respondon, sed diris simple : „Fratoj, mi diras al vi, estas vera miraklo, ke la sorto nin kunigis ĉi tie.”

Tiuj vortoj vekis en Aksenov la suspekton, ke la vera murdinto troviĝas antaŭ li kaj li demandis : „Ĉu oni jam pli frue parolis al vi pri tiu ĉi afero aŭ ĉu vi antaŭe ie renkontis min?”

„Ho, jes,” Makar respondis, „jam pli frue mi aŭdis pri via afero, la tero havas ĉie orelojn. Sed estis antaŭ multaj jaroj, kaj kredu

min, la detalojn de tiu afero mi forgesis.” „Ĉu eble vi iam aŭdis, kiu vere mortigis la komerciston?” demandis Aksenov.

Tiam Makar laŭte ekridis. „Kiu mortigis la komerciston? Sed kompreneble la viro, kiu havis la tranĉilon en la valizo. Aŭ hazarde iu alia devus esti kaŝinta la tranĉilon en vian valizon... Sed se oni ne kaptis lin, li verŝajne ne estas la murdinto. Kiel li ja povus kaŝi sian tranĉilon en vian valizon, ĉar vi ja havis ĝin sub via kapkuseno? Certe vi rimarkus tion.”

Nun Aksenov ne plu dubis : Makar estas la viro, kiu mortigis la komerciston.

Kaj li ekstaris kaj foriris. Kaj dum la tuta nokto li kuŝis maldorma.

Nedirebla malĝojo ekregis lin. Multaj vizioj aperis en lia animo. Jen li vidis sian edzinon, kia ŝi estis en la momento, kiam li ekvojaĝis; jes, tia estis la vizaĝo, la okuloj, li aŭdis ŝian voĉon, ŝian ridon. Jen li vidis la infanojn, kiaj ili estis tiam; tute malgrandaj, unu sur la sino de l' patrino, la alia sur la planko ludanta. Aŭ li vidis sin mem, kia li estis antaŭ longe, tiom juna, tiom gaja, kaj kiel li sidis antaŭ la gastejo kun la gitaro, kiam oni kaptis lin. Kaj li travivis ree la sennoman doloron : li vidis la malhonoran lokon, kie oni vipis lin per la skurĝo, kaj la ekzekutiston kaj la popolon ĉirkaŭe kaj la katenojn kaj la krimulojn kaj la dudek ses jaran punlaboron kaj sian mizeran maljunaĝon. Kaj morta malĝojo falis sur lin. „Kaj tiu fia krimulo estas la kaŭzo de ĉio!” li pensis. Je tiu ĉi ideo ekregis lin tiom da furiozo, ke li tuj volus morti, se li nur povus venĝi sin kontraŭ Makar. Vane li klopodis per longa preĝado forigi la malbonajn pensojn. Dumtage li evitis renkonti Makar kaj neniam li alrigardis lin. Tiel forpasis du semajnoj. Turmentite de doloro kaj maltrankvilo, li ne plu povis dormi kaj nenie li trovis ripozon.

Iutage tiel irante tra la malliberejo, li ekvidis, ke de post unu lito falas sablo sur la teron. Li deziris vidi, kio estas la kaŭzo, kaj haltis por momento. Jen elrampis Makar de sub la lito; timigite li rigardis al Aksenov. Por eviti lin Aksenov volis daŭrigi sian vojon; sed la alia rapide prenis lian manon kaj diris, ke li boras tie truon en la muro kaj ke li ĉiumatene kunportas la sablon eksteren en la ŝuoj, kaj ĵetas ĝin sur la straton, kiam ili iras al la laboro. „Sed promesu, ke vi ne perfidos mian sekreton, grizulo,” li aldonis. „Ni kune fuĝos. Sed se vi parolos unu vorton, ili skurĝos min ĝismorte. Sed mi venĝus min : mi mortigus vin.”

Vidante ĉi tiun viron, kiu multe suferigis lin, Aksenov tremis

pro furiozo. Li retiris sian manon kaj diris : „Mi ne volas fuĝi de ĉi tie, kaj vi ne bezonas mortigi min, ĉar tion vi jam antaŭ longe faris. Kaj rilate tiun akuzon, Dio decidus.”

Kiam la postan tagon la malliberuloj estis kondukataj al la laboro, la soldatoj surprizis Makar, ĝuste kiam li forĵetis la sablon el siaj ŝuoj. Oni traserĉis la malliberejon kaj la truon estis trovata. La direktoro komencis demandesplori la virojn, por ekscii, kiu faris la truon en la muro. Ĉiuj neis. Tiuj, kiuj sciis pri la afero, ne denunciis Makar, ĉar ili sciis, ke lin atendus terura skurĝado.

La direktoro tiam turnis sin al Aksenov kaj diris : „Grizulo, vi estas justa homo, diru al mi, kiu la truon faris.”

Makar tenis siajn okulojn sur la direktoro, ne montrante la plej etan maltrankvilon sur la vizaĝo.

Sed forta emocio kaptis Aksenov; liaj lipoj estis brule varmaj kaj li ne povis eligi unu vorton.

„Silenti?” li pensis. „Kial? Kial mi indulgus la viron, kiu pereigis min? Ho, nun fine mi povas min venĝi, post ĉiuj turmentoj. Ĉu mi denuncu lin?... Li sangos sub la skurĝo... Kaj se li ne estus la murdinto?... Sed krom tio, ĉu mi estus malpli malfeliĉa?...”

La direktoro ripetis la demandon.

Tiam respondis Aksenov, ĵetinte rigardon al Makar : „Estas neeble al mi tion diri, via Moŝto, Dio malpermesas al mi tion. Pli mi ne povas diri. Ordonu al mi ĉion, kion vi volas, vi estas ĉi tie la estro.” Ĉiuj klopodoj de la direktoro por paroligi Aksenov, malsukcesis. Kaj la estraro do ne eksciis, kiu faris la truon. En la sekvanta nokto, kiam ĉiuj kuŝis sur la litoj, Aksenov aŭdis ian susuradon, iu proksimiĝis al lia lito kaj haltis ĉe la pieda fino. Akre rigardante en la mallumon, li rekonis la figuron de Makar.

„Kion vi ankoraŭ deziras de mi?” demandis Aksenov. „Kion vi venas fari?” Makar staris senmove. Tiam Aksenov eksidis en la lito kaj diris : „Kion vi volas? Tuj foriru aŭ mi vokos.” Makar venis pli proksime kaj flustris : „Pardonu al mi, Ivan, pardonu min!”

„Kion mi pardonu al vi?” demandis Aksenov.

„Estas mi, kiu murdis la komerciston kaj metis la tranĉilon en vian valizon; komence mi intencis ankaŭ mortigi vin, sed subite mi aŭdis iom da bruo; mi kaŝis la tranĉilon en vian valizon kaj fuĝis tra la fenestro.”

Aksenov silentis : li ne povis ion diri.

Makar forglitis de la lito kaj diris : „Pardonu al mi, Ivan. Je la nomo de Dio, pardonu min. Mi denuncos min mem. Mi konfesos, ke

mi estas la murdinto de la komercisto. Tiam oni liberigos vin kaj vi povos hejmeniri.”

„Vi opinias tion facila,” diris Aksenov. „Sed jam tro longe mi suferis ĉi tie. Kien mi povus iri? Al mia edzino? Ĝi mortis. Al miaj infanoj? Ili forgesis pri mi. Mi ne havas hejmon, mi ne scius, kien iri.”

Makar ankoraŭ kuŝis surgenue. Kaj frapante sian kapon sur la teron, li kriis : „Pardonon, Ivan, pardonon! La skurĝobatoj ne tiom doloris, kiom via malespero. Kaj se mi pripensas, ke vi tamen kompatis min, ke vi ne perfidis min... Ho, pardonu min, en la nomo de Kristo pardonu la malbenitan friponon!” Li ploris kiel infano. Liaj larmoj falis sur la manon de Aksenov, kiu same ekploris.

„Dio pardonos al vi, Makar. Mi estas eble centfoje pli kulpa ol vi.”

Kaj subite li sentis sin senfine feliĉa, kvazaŭ granda lumo penetris en lian animon. De tiu momento li ne plu malĝojis pro sia hejmo, li ne plus deziris forlasi la malliberejon; li pensis nur pri sia lasta horo. Malgraŭ la konsilo de Aksenov, Makar tamen konfesis sian kulpon. Kaj iutage oni ricevis en Siberio la komunikon, ke Aksenov tuj devas esti liberigata. Sed li ĵus estis mortinta.

(Leo Tolstoï.)

Trad. VANE.

LA GRILO KAJ LA FORMIKO. (Laŭ la Fontaine.)

La grilo, kiu dum somer’
Per trila kant orgenis,
Pro nutromank’, kaj pro mizer’
Dum frost’ ekagoniis.

Nek mus’ — nek vermpeceton plu
Ĝi en la hejmo trovis
Kaj tial al formik’ en tru’
Najbara plendi provis :

„Ho, pruntu du, tri grenojn el
Abunda via kelo.
Je vort’ honora, sen apel’
Mi pagos dum somero.

Zagreb, Kroatlando (Jugosl.)

Kaj pretas mi kun kapital’
Procenton eĉ redoni —
Gril’ diris, sed maltrafis al
Formiko fanfaroni.

„Kaj kion faris vi en temp’
Pli varma, dum sunbrilo?”
Formik’ demandas. — „De l’ printemp’
Ĝis vintro per tril-trilo

Muzikis mi al ĉiu hom’,
Se vi permesas — voje.”
— „Tre ĝojas mi pri via bon’,
Kaj nun — ekdancu, ĝoje!”

JOSIP VELEBIT.

PRI LA LASTAJ TAGOJ DE DOKTORO ZAMENHOF.

...Printempo venis. Li pensadis multe kaj skribadis urĝe. Nova homaro devas organiziĝi... Sed kiom laciga nedormado! Kiom turmenta la deviga sidado! Kiom dolora la batado de l' koro!

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
 El mia brusto nun ne saltu for!
 Jam teni min ne povas mi facile,
 Ho, mia kor'!

Ripozi, dormi eĉ kelkajn minutojn! Unu tagon la kuracisto permesis al li momenton. Estis la 14-a de Aprilo 1917. Li etendiĝis sur kanapo. Al pordo la edzino akompanis la doktoron. Dume li sentis sin pli bone. Fine iom da ripozo, tiom sopirita!... Sed jam li eksufokiĝis. Li volis voki. La voĉo haltis en lia gorĝo. Jen alkuris la edzino. Ŝi helpis lin residi! Ve! jam ĉesis bati tiu koro, batinta tiel forte por la homaro. Jam venis la ripozo liberiga.

Ho, mia kor'! Post longa laborado
 Ĉu mi ne venkos en decida hor'?
 Sufiĉe! Trankviliĝu de l' batado,
 Ho, mia kor'!

En tago pluva, malhela, malvarma, la Varsoviaj Esperantistoj akompanis la ĉerkon al tombejo. Por tiu vasta rondo familia, kies delegitoj ĉiujare lin aklamis en kongresoj, la landlimoj restis fermitaj. Nur kelkaj Poloj, Grabowski, Belmont, germana ŝipestro Neubart, povis diri adiaŭon en la nomo de tiu ĉiulanda popolo, kiu lin amis kaj priploris en la tuta mondo. De la registaro, neniu. Honorigo, nenio. Nur la amaso popola, la humila klientaro de l' hebrea kvartalo, en siaj laborvestoj. Multaj junuloj dankemaj. Multaj geviroj kortuŝitaj.

Kiel la enterigo de Tolstoj inter vilaĝanoj, ĝi estis la plej alta, la plej taŭga simbolo. Efektive nur mortis la homo, la viro 57-jara, la malriĉa okulisto. Sed restis la granda verko... Eterne vivos kaj diskreskos ĉie lia semo pensa. Jam dekmiloj da homoj sanktigis lian nomon. Iam tuta homaro rekonos lin gvidanto al frata repaciĝo.

Sur lia skribotablo kuŝis lasta manskribaĵo krajona, nefinita. Ĝi estis plano de artikolo pri senmorteco de l' animo. Kion kredis mem tiu granda amiko de l' homaro? Kia do estis la fundo de lia kredo? Kiel li pensis pri aferoj transmortaj kaj nekontroleblaj?

Pri sia persono li estis silentema ĉiam. Liaj proksimuloj eĉ ne povus respondi. Ili vidis nur kiamaniere li vivis : bonkore, pure,

modeste, helpeme, ofere, mirinde pacience kun ĉiuj, neniam ofende per ago aŭ parolo kontraŭ iu ajn, ĉiam simpatie aŭskulteme al ceteraj homoj, eĉ al tedaj. Al ĉiuj, edzino, fratoj, gefiloj, nevinoj, amikoj, klientoj, li aperis kiel homo sankta. En turmentaj horoj ĉiuj venis al li por konsilo. „Li neniam pekis,” diris malnova servantino pola, montrante lian portreton sub ŝia krucifikso. Kiom da famuloj restis grandaj en la okuloj de l' servantoj ?

(El : Vivo de Zamenhof, de E. Privat.)

LUDOJ.

La blinda leterportisto. La ludantoj formas rondon. Unu, la leterportisto, staras en la mezo kun tuko antaŭ la okuloj. Ĉiuj ludantoj estas numeritaj. La leterportisto diras : „Mi sendas leteron de numero ok al numero dudekvin.” Tiuj ĉi numeroj devas interŝanĝi siajn lokojn, dum la blindulo klopodas kapti unu el ambaŭ. La kaptito fariĝas leterportisto.

Tuŝu... La gvidanto diras : „Tuŝu feron,” „tuŝu lignon,” „tuŝu ion verdan.” aŭ ion similan. Ĉiu ludanto rapide klopodas fari tion. La lastsukcesinta ne plu kunludas. Ofte la ludantoj eĉ ne vidas proksiman objekton tuŝeblan. La ordonojn oni faras laŭ la cirkonstancoj.

Faru tion, faru tiel. La gvidanto staras antaŭ la ludantoj kaj prezentas diversajn simplajn movojn. ekz. : genuflekson, braksvingon, kapskuon, ktp. Kiam li diras : „Faru **tion**”, ĉiuj aliaj imitas lin; kiam li diras : „Faru **tiel**”, neniuj rajtas movi sin. Kiu eraras, devas foriri. Kiu restas ĝis la fino, estas venkinto.

Ho katinjo. La ludantoj sidas en granda rondo sur la planko. Unu estas „katinjo” kaj devas sur piedoj kaj manoj en la cirklo rondiri. La kato miaŭas al unu ludanto, kaj tiu ĉi devas karesi la beston unu fojon sur ĝia kapo kaj diri al ĝi : „Ho, katinjo”. Se la ludanto ridas, li mem fariĝas „katinjo”. La kato rajtas fari grimacojn, sed ĝi ne tuŝu la ludantojn.

Varme, malvarme. Unu ludanto forlasas la ĉambron kaj la aliaj interkonsentas pri serĉota objekto. Tiam oni vokas la serĉanton, kaj oni komencas kanti, laŭte kiam li estas malproksime de la serĉata objekto, kaj ĉiam pli mal-laŭte, kiam li venas proksime al ĝi, ĝis li fine trovas ĝin. Tiam li elektas novan serĉanton.

Tio pensigas min pri... La ludantoj sidas en rondo ĉirkaŭ la tablo. Unu ekdiras : „Mi pensas pri kaldrono. La dua diras : „Kaldrono pensigas min pri vaporo.” Tria : „Vaporo pensigas min pri ŝipo.” Kvara : „Ŝipo pensigas min pri vojaĝo.” Ktp. Post unu aŭ du rondiroj oni ripetas la serion en inversa sinsekvo, do oni komencas per la lasta vorto kaj finas per „kaldrono,„. Ĉiu, kiu eraras aŭ haltas, ne plu kunludas.

Kio okazas? Ĉiuj estas blindigitaj. La gvidanto faras diversajn agojn, kiujn ili laŭsone devas rekoni, ekz. plenpumpadon de pneŭmatiko, batpurigado de mato, fermo de libro, ktp.

Kantanta ŝlosilo. Oni ligas ŝlosilon al ŝnuro, kies ekstremaĵoj estas kunligitaj. Ĉiuj ludantoj dense sidas en rondo, suprentiras la genuojn, tenas per la manoj la ŝnuron sub la genuoj. Ili kantas diversajn kantojn, kaj dume rondirigas la ŝnuron. Ĉirkaŭ la rondo marŝas unu ludanto, kiu devas eltrovi, kiu persono havas la ŝlosilon. Kompreneble la ŝlosilo estas ĉiam en la manoj de alia persono. Kiam la rondiranto bone divenis, li povas eksidi en la rondo kaj la „eltrovito” devas ĉirkaŭmarŝi.

Diveni la personon. Pendigu grandan tukon, en kiu estas malgranda truo, sufiĉe granda por traigi nazon. La ludantoj metas laŭvice sian nazon tra la truon, kaj aliaj je la alia flanko devas diveni, kies nazo ĝi estas. Variaĵo : la saman ludon oni povas fari per manoj, piedoj, siluetoj, ktp.

Tri estas tro multe. Granda rondo el paroj, unu post la alia, vizaĝoj al la mezo de la rondo. Du personoj ekster la rondo. Unu devas kapti la alian, kiu forkuras kaj ekstaras antaŭ iun paron. La malantaŭa el la tri tiam forkuras, ktp. Kiam la ĉasisto kaptas iun, li mem forkuras en inversa direkto, kaj la alia fariĝas ĉasisto.

Okulumi. Ne tro granda rondo el paroj, vizaĝoj al la mezo. Unu ludanto devas esti sola. Li okulsignas al iu antaŭstaranta ludanto, kiu penas kuri al li, sed kiam li ricevas frapon de sia poststaranta kunulo, li ne rajtas forkuri. Tiam la „solulo” rapide okulsignas al alia ludanto, ĝis li fine ekhavas kunulon. Tiu, kiu restas sola, nun devas okulsigni. Post kelka tempo la antaŭaj kaj malantaŭaj interŝanĝas la lokojn.

Alkmaar (Ned.).

C. HELLEMAN.

LA HUNDO.

Malgranda knabo, staranta antaŭ la malfermita pordo de buĉejo, fajfis ripetfoje. Post duona horo la buĉisto koleretis.

„Ne faru tiom da bruo!” li konsilis.

La knabo, timigita, diris : „Mi perdis mian hundon.”

„Ĉu vi eble kredas, ke mi havas la beston?”

„Mi ne scias”, estis la singarda respondo. „Sed ĉiufoje, kiam mi fajfas, movas sin la kolbasoj, kiuj pendas tie.”

Ĉiu, kiu verbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace jarkolekton de „La Juna Vivo”.

Do multvalora libro de proksimume 200 paĝoj.

OKULVITROJ.

La o-kul-vitrojn mi jam sur - prenis vi - di ki - u do danci

ve-nis mi lege tro-vas ke nun ne po-vas mi plue vi - vi ja sen

vi tra la la la la tra la la la la Mi le - ge tro - vas ke nun ne

povas mi plue vivi ja sen vi

Amsterdamo.

Trad. KLATIL.

La dancrondo turniĝas maldekstren, malgranda interna rondo el knaboj dekstren.

I. La knaboj faras, kvazaŭ ili surmetas okulvitrojn.

II. La knaboj faras, kvazaŭ ili legas.

III. Ĉiu knabo haltas antaŭ la plej apuda knabino en la rondo.

IV. Dancante la geknaboj turniĝas ĉirkaŭ si mem, manfrapante.

V. Duope ĉirkaŭdanci sur sia loko, streĉante la dekstrajn brakojn, la maldekstraj brakoj fleksitaj antaŭ la brusto (duobla manturniĝo). Inverse ripeti dekstren.

PARENCAMO.

A : Mia frato en Aŭstralio ne estas ege parencama. Antaŭ tridek jaroj li forlasis nin kaj ne pli frue ol hieraŭ venis lia unua letero.

B : Estis certe granda surprizo por vi. Kion li skribis?

A : Mi ne scias. Mi malakceptis la leteron, ĉar ĝi ne estis sufiĉe afrankita.

SinJORINO al alia : Via Karlo ne estas inteligenta en la lernejo. Ne gravas. Li ofte kopias la problemojn de mia filo. Ankaŭ ne gravas. Sed hieraŭ mia Henriko faris eraron en la kalkulado kaj via Karlo, havanta la saman eraron, tial batis mian filon. Ion tian mi ne povas toleri !

Por komencantoj.

TRO MULTE DA GASTOJ.

Hispana nobelulo, kiu estis same fiero kiel malriĉa, vagadis tra Francujo. Iun vesperon li venis en malgranda vilaĝo. Ventegis kaj torente pluvis. La sinjoro estis morto laca kaj malseka ĝis la haŭto. Fine li vidis gastejon, la sola en la vilaĝeto. Li frapis sur la pordon kaj post longa atendado fenestreto en la subtegmento malfermiĝis.

„Kiu estas tie, kaj kion vi deziras?” sonis la voĉo de la mastro. La fierulo respondis: „Mi estas Don Juan Pedro Fernandez Rodriguez di Villa, grafo de Malaffra, sinjoro de Santiago kaj Aliandaro, kaj petas tranoktejon.”

„Por tiom da sinjoroj mi ne havas ĉambrojn!” respondis la gastejestro. Li ĵetfermis la fenestron kaj la alta sinjoro devis pasigi la nokton ekstere.

Respondu al jenaj demandoj :

Tra kiu lando vagadis la nobelulo? Al kiu nacio li apartenis? Kie li iam venis? Kia estis la vetero? Kial la sinjoro serĉis gastejon? Ĉu estis multaj gastejoj en la vilaĝo? Ĉu la sinjoro povis malfermi la pordon de la gastejo? Kion li faris? Ĉu oni tuj aŭdis lin? Ĉu oni malfermis la pordon? Kie aperis la mastro? Ĉu la nobelulo simple petis tranoktejon? Kial la gastejestro ne malfermis la pordon? Kie la sinjoro devis dormi?

BLUFADO.

Estis dimanĉo. Ĝardenisto kaj kupraĵisto promenis kune al najbara vilaĝo. Ili preteriris ĝardenon, kie i.a. kreskis brasikoj.

„Vidu,” diris la kupraĵisto, „kiom granda brasiko kuŝas tie sur la kampo! Tiom grandan mi antaŭe neniam vidis. Ĉu vi?”

„Ĉu vi opinias ĝin vere granda?” estis la respondo. Iam mi havis ekzempleron en mia ĝardeno, kiu estis multe pli granda. Ĝi estis tiel granda, kiel la porkejo tie.”

„Nu, nu,” diris la kupraĵisto, „tiam ĝi vere estis giganta. Tamen mi scias pli multe pri kaseroloj. En nia laborejo ni iam konstruis kaserolon, kiu estis same granda, kiel — jes, kiel la dometo, tie!”

„Ho,” rediris la alia, „nun vi iomete troigas laŭ mi! Mi preskaŭ ne povas kredi tion. Por kio oni uzis tiun kaserolon?”

„Tutsimple,” estis la amuza respondo, „en ĝi oni kuiris vian brasikon!”

La ĝardenisto ruĝiĝis kaj baldaŭ parolis pri alia afero.

Respondu al jenaj demandoj :

Kiuj promenis? Kien ili iris? Kion ili vidis? Kio kreskis en la ĝardeno? Ĉu ankaŭ estis granda brasiko? Ĉu la ĝardenisto opiniis la brasikon granda? Kiom grandan brasikon li iam havis? Ĉu la kuprajisto havis komprenon pri brasikoj? Kion li rakontis pri kaserolo? Ĉu la ĝardenisto kredis lin? Kion li demandis? Kion respondis la kuprajisto? Kion farus la ĝardenisto?

SUR LA TRONO DE FRANCIO.
Rakonto de la luno.

„Hieraŭ,” tiel komencis la luno, „mi rigardis la belan Parizon; mia okulo enpenetris en la salonoj de Louvre. Maljuna patrineto, malriĉe vestita, sekvis lakeon en la granda, malplena transalono. Ĉi tiun ŝi nepre volis vidi. Kostis al ŝi multajn donacetojn kaj multajn afablajn vortojn antaŭ ol oni ŝin enlasis. Ŝi plektis la manojn kaj respektplene rigardis ĉirkaŭ si, kvazaŭ si troviĝis en sanktejo.

„Ĉi tie estis,” ŝi diris, „ĉi tie.” Kaj ŝi alproksimiĝis al la trono. „Tie,” ŝi kriis, „tie”. Kaj ŝi surgenuis kaj kisis la veluron de la trono; ŝi ploris.

Kiu estis la maljunulino? Mi rakontos al vi historion.

Okazis en la julia revolucio, je la vespero de iu glorplena tago, kiam ĉiu domo estis fortikaĵo. La popolo kuratakis la Tuileriojn. Eĉ virinoj kaj infanoj troviĝis inter la batalantoj; ili enpenetris la ĉambrojn de la kastelo. Malriĉa, duonkreska knabo, vestita per ĉifonoj, kuraĝe batalis inter la pli aĝaj batalantoj. Vundite de bajonetpikoj li ŝvenis. Oni metis la sangantan knabon sur la tronon. Estis impone : la belega salono, la batalantaj grupoj ! Deŝirita standardo kuŝis sur la tero, la trikolora flago pendis super la bajonetoj; kaj sur la trono la malriĉa knabo kun la mortpala vizaĝo; la nuda brusto, la mizeraj vestoj, duone kovrita per la riĉa, arĝentbrodita veluro.

Ĉe la lulilo de la knabo oni profetis : „Sur la trono de Francio li mortos.” Kaj la patrino revis pri dua Napoleono. Miaj radioj kisis la florojn sur lia tombo; miaj radioj en ĉi tiu nokto kisis la frunton de la avineto, dum ŝi en siaj revoj vidis la spektaklon :

La malriĉa knabo sur la trono de Francio.

Laŭ Andersen.

Trad. : LECHELLE, Parizo.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

Ĝojiga novaĵo : Ni jam rakontis, ke ni por la junularkunveno en Groet povas disponi pri la tiea lernejo. Nun la komunumestraro de Schoorl permesas al ni samcele uzi ankaŭ la modernan, grandan gimnastikejon, kiu enhavas salonon 20×9 m., vestejojn, k.t.p. Malantaŭ la konstruaĵo kuŝas sport-kampo, por starigi tendojn.

Ankoraŭ pli : Oni permesas al ni uzi la grandan konstruaĵon, apartenanta al la „Katolika Unuiĝo”. Ĝi enhavas scenejon, pianon, ktp., tiel ke ĝi bonege utilas por niaj intimaj kunvenoj. — Krome ni povas prepari la buterpanojn tie kaj por tio la tuta inventaro estos je nia dispono.

Ni do povas prince akcepti almenaŭ 200 gastojn.

Pri la financoj : La mono sufiĉe kontentige alfluas. Diversaj grupoj kaj personoj jam mendis lotojn. Ni jam forsendis 3000, restas ankoraŭ 2000. Ni permesas al ni denove instigi la legantojn vendi lotojn kaj bildkartojn.

Kiel atingi Groet : La angloj verŝajne liveros la plej grandan nombron de la partoprenontoj. Laŭ ni la plej malkara kaj agrabla vojaĝmaniero por ili estas iri per vagonaro al Dover, de tie per ŝipo al Oostende kaj pluen per aŭtobuso al Groet. Veturante de Oostende al Groet ili trairos la tre antikvajn urbojn Brugge kaj Gent, kiuj estas ege vizitindaj. La vojaĝantoj povas tranokti en Antverpeno en la junulardomo kaj la venontan tagon daŭrigi la vojaĝon laŭ la vojo Breda, Roterdamo, Hago, Haarlemo al Groet. Se ili faras la ŝipveturon je la 9-a de aŭgusto, ili je la 10-a de aŭgusto, posttagmeze, povas atingi Groet.

La ŝipveturo, tien kaj reen kune, kostas nur 6 gld. (13 ŝil 6 p.). La aŭtobusvojaĝo Oostende-Groet, tien kaj reen, kostas ankaŭ proksimume 6 guldenojn. En la reveturo la karavano povus viziti Bruselon kaj tranokti tie. — Ĉi-vojaĝo estas multe pli malkara kaj samtempe pli agrabla ol la vojaĝo laŭ Harwich-Vlissingen-Groet.

Provizora programo :

Merkredon : Je la 17a h. : komuna manĝo; 18a h. : malgranda promenado al la maro. 20a h. : malfermo kaj salutparoloj en la konstruaĵo de la „Katolika Unuiĝo”.

Jaŭdon : Promenado en la dunoj. Mar- kaj strandplezuro.

Vendredon : Per tramo al Alkmaro. Vizito al la fromaĝ-foiro. Promeno tra la interesa urbo. Poste per tramo al Bergen. Vizito al la ludĝardeno tie. Piede de Bergen al Groet.

Sabaton : Antaŭtagmeze kaj posttagmeze al la dunoj kaj la maro.

Vespere : Festo en la granda salono de la kafejo „La ora leono” en Schoorl. Malfermo je la 19a horo.

1. Komuna kantado : La Espero; Maja kanteto (No 1 en la „Juna Vivo”-kantaro; La Vintro jam forpasis (No 4, nur knabinaj voĉoj).

2. La infanoj el West-Grafdijk ludos la teatraĵeton „La Novaj Vestoj de la Reĝo”.
3. Dancado de francaj knabinoj, kiuj prezentos malnovan francan popoldancon.
4. Dancado de pola knabino.

Paŭzo (20 minutoj).

5. Komuna kantado el „La Juna Vivo”-kantaro : Vekiĝu (No 2); La Oreolo (No 15); La floroj de l' ĝardeno (No 20).
6. La infanoj el Birmingham (Anglio) prezentos la teatraĵeton : „La Ĉemizo de la Feliĉulo”.
7. Popoldanco de infanoj el Kimrujo.
8. Komuna kantado el „La Juna Vivo”-kantaro : Ekdormas lag' (No 32); Trifoli' (No 33); Malriĉa fremda Knabo (No 13).
9. Fermo.

Verŝajne infanoj el aliaj landoj ankoraŭ kunlaboros en la programo.

Dimanĉon : Akceptado de vizitantojn. Komuna iro al la dunoj kaj la maro. En la dunoj la francaj infanoj prezentos la teatraĵeton : „Paŝtisto de Porkoj”, de Andersen. Komuna kantado. Vespere : Lumbildoj pri Volendam kaj la sekigo de la Suda Maro.

Lundon : Ekskurso per aŭtobusoj al Volendam kaj laŭlonge de Ysel-lago : Vizito al la malnovaj urbetoj Hoorn kaj Enkhuizen. Pluen al la fama Sudamara-digo en Wieringen.

Mardon : Ekskurso al la maro. Ludoj kaj popoldancoj sur la marbordo (atentu la lastajn numerojn de „La Juna Vivo”). Adiaŭa vespero.

Merkredon : Foriro.

Staras sur la ĝenerala programo ankoraŭ diversaj teatraĵetoj, ŝaradoj, dancoj, lumbildparolado pri la vojaĝo al Svisio kaj Parizo en 1937, kiujn ni prezentos en intima rondo.

Ni ripetas la prezojn : Holandanoj pagas 7,50 guldenojn, alilandanoj nur 3,50 guld. La ekskursoj estas enkalkulitaj.

Por ŝtopi la breĉon :

v. E. en Langereis : f 0,90; P. en Wormerveer : f 0,25; K. en Hoogezand : f 0,10; R. R. en Neath (Angl.): f 2,25; S. D. M. en A'dam : f 1,40; S.ino H. Dr. en Hago : f 2,50; Kino L. en Nancy : f 1,00; Esp. Grupo en Nancy (Franc.) : f 1,10; Angla amiko : f 8,90; M. en Leerdam : f 0,25; G. B. en Starnmeer : f 7,50; B. W. en West-Grafdijk : f 7,50; D. B. kaj A. B. en West-Graftijk : f 5,00; Sp. en Enkhuizen : f 2,50; G. K. en West-Grafdijk : f 2,50; N. G. en Kwadijk : f 2,50; M. B. en Koudekerke : f 2,50; K. en Leerdam : f 2,50; N. K. en West-Grafdijk : f 2,50.

La lotojn por la internacia junularkunveno S.ro Muuses en Purmerend senpage presis. La komitato multe dankas pro tio !

4-a LISTO DE PARTOPRENONTOJ.

65. Ena Goode (12) 21, Tinkers Farm Road, Northfield.
 66. Joan Baley (13) 32, St. Helens Road. »
 67. Ruby Cooper (13) 162, Borrowdale Crescent. »
 68. Margaret Scarle (13) 4, Barnsdale Crescent. »
 69. Ethel Hobbis (16) 114, Trescot Rd. »
 70. Elsie Goode (17) 103, Elmdale Crescent. »
 71. Ivy Homer »
 72. Freda Singleton. »

La gvidantinoj estos : 73. F.ino N. R. Sheppard, 118, Oak Tree Lane, Selly Oak, Birmingham; kaj 74. F.ino Suargejt.

Knabina grupo en Bishop Auckland (Anglujo) :

75. Elenor Pape (11 j.); 76. Moraq Donald (12); 77. Andrey Oliver (12); 78. Rosamund Causom (12); 79. Elsie Sanderson (12); 80. Margaret Smith (12); 81. Marjorie Smith (12); 82. Annie Stewart (12); 83. Alison Boothroyd (13); 84. Patricia Davison (13); 85. Betty Gray (13); 86. Editte Stodyson (13); 87. Betty Lane; 88. Irene Mothersdate (13); 89. Dorothy Oates (13); 90. Evid Peart (13); 91. Maisie Smith (13); 92. Winifred Armstrong (14); 93. Joyce Coninq (14); 94. Gwennie Cooper (14); 95. Betty Ellwood (14); 96. Margaret Marquess (14); 97. Winnie Applehy (15); 98. Margaret Fotherqill (15); 99. Joan Iove (15); 100. Eleonor Mason (15); 101. John Gray (17); 102. Etta Johnson (18). La gvidantinoj estas : 103. F.ino M. Rowlandson; 104. S.ino Mrs. Rixham (Newcastle); 105. F.ino A. B. Edwards, 10 Lady Smith Str., Bishop Auckland.

Dua gvidantino de la grupo el Seven Sisters (Anglujo) (vidu „L. J. V.”, No 8) estos : 106. F.ino Rees en Birmingham.

Nederlandaj knabinoj : 107. Alie de Maijer en Koedijk (17); 108. F.ino Tromp en Stomporetoren (18); 109. T. Steijn en Koedijk (15).

Nederlandaj knaboj : 110. Piet Slagt, Hoornse Jaagweg 207, Middelie.

Pri la kunveno ni farigos filmojn, moviĝantan kaj nemoviĝantan. Tiaj filmoj formas agrablan memoraĵon pri la restado en Groet, kaj krome ili povas servi kiel propagandiloj por nia movado.

Ni zorgos, ke ili malkare estos akireblaj. Por la moviĝanta filmo estos uzata rubando ok milimetra, por la nemoviĝanta rubando dek ses milimetra.

Baldaŭ aperos tre bela, riĉe ilustrita, esperantlingva prospekto pri Groet, kiu senpage estas mendebla al : V. V. V. „Groet-Camperduin”. Ni faros nian eblan, ke ankaŭ pri Alkmaar aperu tia prospekto.

POSTKONGRESA JUNULARA TENDARO.

Post la Unuversala Kongreso estos junulara tendaro apud Ipswich en Anglujo. La tendarejo situas meze de erikeja kamparo, ĉirkaŭ 10 km. for de la urbo Ipswich. Ĉiajn informoj estas haveblaj ĉe la Kongresoficejo Herons-gate Rickmansworth Herts), Anglujo.

Subtenu la Internacian Junularlaboron !



LA JUNA VIVO VOJAĜO

AL SVISIO.

La somervojaĝo al Praha kaj Tirolo ne okazos. La redakcio planis alian vojaĝon, nome al la centra parto de Svisio.

Jen la programo :

24 julio : Amsterdamo, Utrecht, den Bosch, Eindhoven, Liège, Spa, Stavelot, Salmchateau. La vojo tra Ardenoj do estas alia (kaj pli bela) ol tiu de la antaŭa jaro.

25 julio : Salmchateau, Luxemburg, Metz, Nancy, Luneville, Raon l'Etappe, Gerardmer.

26 julio : Promenado en la belega ĉirkaŭaĵo de Gerardmer.

27 julio : Gerardmer, Le Thilot, Bazel, Liestal, Hauensteinpas, Olten, Zofingen, Sursee, Luzern. En la ĉirkaŭaĵo de Luzern, sur la bordo de Kvarkantona-lago, estos la tendejo. De tie ni faros diversajn ekskursojn. Vespere ni revenos al la kampejo, tiel ke ni ne bezonas starigi kaj malstarigi la tendojn ĉiutage.

28 julio : Promenado tra Luzern, la famkonata urbo. Ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo, i. a. al Kriens, Sonneberg, Gütsch.

29 julio : Per aŭto al Süssnacht, de tie al la supro de Rigi (Rigi Kulm 1800 M.). La supreniro okazos parte per aŭto (ĝis 1000 M.), parte piede. Piede de Rigi Kulm al la ĉarma vilaĝo Weggis ĉe la bordo de la lago. De tie per aŭto al la tendejo.

30 julio : Per aŭto al Hergiswil. Grimpemuloj povos surgrimpi Pilatus (2123 M.). Iro al la supro kaj reiro kune daŭros 8 horojn. La aliaj ekskursos al Bürgenstock, kie prezentas sin la panoramo de la lago kaj Rigi!

31 julio : Laŭlonge de la lago tra la idiliaj vilaĝoj Weggis, Vitznau, Gersau al Brunnen. Plue al Stoos (1290 M.). La lastan parton ni piediros. Daŭros du horojn. Reveno per aŭto al la kampejo.

1 aŭgusto : La fama ŝipekskurso de Luzern al Flüelenè Precipe la lasta parto, la ŝipveturo sur la Urner See estas rava. De Flüelen per aŭto al Göschenen (kie komencas la Sta Gotharda tunelo) kaj Andermat. De tie piedekskursoj. Ni tranoktos en Andermat aŭ en Hospental.

2 aŭgusto : Hospental, Furkapasejo (2431 M.), Gletsch, Grimselpasejo (2165 M.) al Meiringen. Piede al la impona Aerschluht. De Meiringen trans Brünigpasejo, tra Sarnen al Luzern.

3 aŭgusto : Luzern, Gerardmer.

4 aŭgusto : Libera tago.

5 aŭgusto : Gerardmer, Nancy, Verdun (vizito al la batalkampo), Sedan.

6 aŭgusto : Sedan, Givet, Dinant, Namen, al Bruselo. Veturo tra la urbo. Vizito al diversaj vidindaĵoj.

7 aŭgusto : Bruselo, Breda, Roterdamo, Hago, Amsterdamo.

Do : 15 taga ĝuo en la naturo. Kaj ĉio ĉi kostas nur 54 guldenojn. Enkal-kulita estas la ŝipekskurso kaj la tranokto en hotelo.

Kiu kunprenos propran tendon ricevos rabaton : du guldenojn por ĉiu dormloko kiun ĝi enhavas. Por tendo de 2 × 2 metroj oni ricevas 4 guldenojn.

Pagmaniero : 10 guldenojn antaŭ la unua de majo, aŭ ĉe la anonco. La restaĵon antaŭ la 15-a de julio.

Estas dezirinde baldaŭ anonci sin, ĉar la nombro de sidlokoj estas limigita. Anoncis sin jam 17 personoj, kiuj partoprenis en la lastjara vojaĝo.

La societo vojaĝos per kolektiva pasporto. La pasaĝeroj bezonas nur pruvon pri nederlandaneco.



RICEVIAJ ESPERANTAJOJ

NOVA SOKOLA INFORMILO. Luksa prospekto, 12 paĝa, bele ilustrita, pri la Sokola Gimnasta Kongreso en Praha 1938, eld. de la Ministerio de Komerco. — Oni petu senpagan alsendon ĉe la Ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo Praha, XIX, Uralské 9.

„MONDO SEN MILITO”. Alvoko al la kristanaj eklezioj en ĉiu lando. 4-paĝa flugfolio, kiu entenas la porpacan alvokon de la Societo de Amikoj (Kvakeroj) de Anglujo kaj Usono. Prezo : 12 ekz. por 4 p. The Friends' Peace Committe, Friends House, Euston Rd., London NW. 1, Angl.

„INTERNACIO DE MILITKONTRAŬULOJ”. Raporto pri la internacia movado, julio 1934-julio 1937. Grace M. Beaton (ĝenerala sekretariino). Antaŭparolo de la prezidanto G. Lansbury. 28 paĝa libreto, enhavanta mal-longan raporton pri la laboro de malgrandaj grupoj de geviroj en 68 landoj de la mondo. La organizo estas fondita antaŭ 18 jaroj, kun la celo kunligi en internacia fratularo ĉiujn homojn, kiuj decidis rezisti ĉian militservon. Prezo 3 p. Adr.: 11, Abbey Rd., Enfield, Middlesex, Anglujo.

„JESENICE”, Gorenjsko, Jugoslavio. Bele ilustrita faldprospekto, senpage havebla ĉe : „Niaj Vizaĝoj”, Ljubljana, Jugoslavio.

„LA TURO PRI HONORO AL LA FLANDRAJ HEROOJ EN DIKSMUIDE”. Bele ilustrita, 16 paĝa libreto. Eld.: Sekr. pri Izerpilgrimado. Senpage havebla ĉe la sekretario : M. Dolaeghestraat, 39, Diksmuide, Belgujo.

Xa JUBILEA KONGRESO „LA ESTONTO ESTAS NIA”, 16, 17, 18 aprilo. Sigelmarko, verde presita, formato 3,3 × 5,4 cm. Oni povas aĉeti folion de 30 sigelmarkoj por 0,10 guld. Adr. : F.ino E. Keller, Fr. Hendrikplantsoen 14, Amsterdam-W., Nederlando.

SIGELMARKOJ, desegnitaj de pentro-artisto. 10 diversaj ekz. en unu folio. Eld. „Moderna Mondo”, Budapest VII, Szövetség-u. 28/b. Prezo : 100 pecoj kostas 3 resp. kup.; 1000 pecoj kostas kvin resp. kup.

„POŝTKARTOJ”, jugoslavaj, kun la surskribo „Naciojn egaligas Esperanto.” Eld. : „Niaj Vizaĝoj”, Ljubljana, Reslavo 29. Prezo : 10 pecoj 7 din. (2 resp. kup); 25 ekz. 16 din. (4 resp. kup); 100 ekz.: 50 din. (16 resp. kup).

ENIGMOJ

1. Stup-enigmo.

... × ...	1. parto de la korpo.
... × ...	2. meblo.
... × ...	3. parto de la kapo.
... × ...	4. monato.
... × ...	5. danĝera besto.

La vortoj konsistas el 5 literoj kaj la mezaj literoj, legitaj de supre mal-supren, formas la nomon de tre utila besto.

Hilversum (Ned.) G. FRANSEN.

2.

1 2	d, n, n, o, o, o, o, o, o,
...	s, s, u.
1	La vortoj signifas, horizon-
	tale kaj vertikale :
2	1. ĉielan korpon;
	2. akvoŝvelon.

(Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis 1 junio.)

T. Sv. MARTIN (ĈSR.) D. VOJO.

LA SOLVOJ EL No 8.

Bordo, hordo, kordo, lordo, mordo, nordo, pordo.

Lordo, kruro, tablo, pilko, trono. La rusa monero estas rublo.

La premiojn gajnis : W. Brade, Berlino (Germ.) kaj J. M. Ranzijn, 't Zand (Ned.).



SKRIBA KURSO DE LA JUNA VIVO

Por la skriba kurso anoncis sin 266 personoj. Kompreneble la redakcio nun ne povas disloti senpagan vojaĝon al Svisujo. Ĝi donace sendis al diversaj varbintoj jarkolektojn de „La Juna Vivo”. Kiu varbis kursanojn, kaj ankoraŭ ne ricevis tian donaceton, tuj skribu al la redakcio. Ĝi tuj sendos jarkolekton aŭ iun alian libron !

Listo da personoj, kiuj helpis en la varblaboro :

Sino O. R., Purmer (2); M. v. d. H., Rotterdam (10); G. Woudenberg (4); v. W., Amsterdam (10); R., Soest (12); G., Leiden (1); G. v. A., West-Graftdijk (1); H. K., Knollendam ((9); M. B. Koudekerke (3); A. K., den Haag (6); B., Bakkum (7); H. H., Ede (4); Z., Limmen (21); P., Breezand (7); K. Leerdam (10); M., Leerdam (8); K., Amsterdam (1); C. v. E., Wasenaar (14); H., Tjalleberd (1); Sino v. d. K., Winkel (24); K., Terapel (25); B., Zaandam (5); B., Groet (4); Sino B. B., O. Graftijdijk (1); B. O., Abbekerk (2); W., Balkbrug (4); K., Hoogezand (5); de K., en Volendam 23.

La ceteraj kursanoj persone anoncis sin.



KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson ne pli grandan ol du linioj.

Buljarujo : Lernanto en la sepa klaso de knaba gimnazio dez. korespondi kun gelernantoj. Aleksandro Dunĉev, Str. „Musala” 13, Pleven.

Ĉeĥoslavakujo : S.ro J. Hosa, prirnĉi, Podskalskaà 48, Praha II, dez. kor. k. interŝ. poŝtm. Respondo certa. (19 jara komizo).

Danujo : Kelkaj gekomencantoj (12-14 jaraj) dez. kor. k. eksterlandanoj. Interŝ. poŝtm. Resp. certa. O. Himmelstrup, Törresö, Otterup.

Danujo : S.ro Rik. Kristensen, Finnlandsgate 10¹¹¹, Aalborg, dez. kor.

Estonio : Mi dez. kor. kun gek.doj en ĉiuj landoj, per let., il. poŝtk. Mi estas 18-jara junpoeto. U. Käärrik, Tarvastu.

Francujo : Prof. Giraud dez. de japana samideano korespondon pri kampa vivo, specimenojn de Daizu kaj aliaj orientaj semajoj (diri prezon). Aix-en-Provence, les Tilleuls, Avenue Postav.

Hungarujo : El ĉiuj landoj serĉas la Junulara Sekcio de HEF gekorespondantojn. St. Benesik, Budapest VIII, Ullői-ut 20.

Islando : S.ro Gunnar Rasmussen, Laugaböt, Mosfellsveit, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

Jugoslavujo : S.ro Rešek Franjo, studento, Beltinci, Dravstra, Ban. dez. interŝ. poŝtm. Posedas multajn.

Nederlando : Por propagandi inter doganistoj esp. mi bezonas ilian helpon. Esp. Doganistoj ĉiulandaj sendu karton al : J. Krispijn, Wognumerstraat 43, post Nieuwendam, Amsterdam-N.

Nederlando : 17-jara liceano volas korespondi kun eksterlandano pri diversaj temoj. R. Hinloopen, Eemnesserweg 143, Hilversum.

Nederlando : S.ro J. M. Ranzijn, 't Zand (N.H.), 23-jara, dez. kor. kun S.roj aŭ S.inoj et la tuta mondo, pri la abelkulturo. Respondo certa.

Nederlando : S.ro J. Poets, Meerlo (Limburg), dez. kor. kun samideanoj en ĉiuj landoj.

Nederlando : S.ro A. J. v. Dijk, Hooglandstraat 54b, Rotterdam, dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj.

Nederlando : F.ino J. Plas (18 jara) Zocherstraat, 20, Alkmaar, dez. kor. kun ĉiulandaj geamikoj. Respondo certa.

Francujo : Kelkaj fervoraj geesperantistoj dez. kor. k. ĉ. l. gesamideanoj, pri ĉ. t. Ankaŭ laŭvole interŝ. pm., fotojn, kaj cetere. Skribu multnombre al : S.ro F. Depreux, 17 rues des Alliés, Busigny (Nord). Petas resp. K. Katugin, Z. Parova, M. Comstedt, k. c.

Ĉeĥoslovakujo : Du 20-jaraj slovakoj dez. kor. kun gesamideanoj ĉiulandaj. Skribu al M. Kucin, komerca akademio, Košice.

Francujo : F. J. Krüger, ĵurnalisto, Hotel Randabel, Marvejols (Lozère), dez. kor. dulingve (en esp. k. nacia lingvo) kun Anglujo, Germanujo, Nederlando, Francujo, Hispanujo, Italujo, Portugalujo, Svedujo, Danujo.

Germanujo : Gefratoj Freutsmiedl, Oberbuch, Post Tyrlachin, Ob., dez. kor. kun la tuta mondo, precipe kun poŝtm. kolektantoj.

Nederlando : La Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE) starigis Internacian Korespondan oficejon por Geinstruistoj kaj Gelernantoj. Ĉiuj, kiuj dez. interkor. kun alilandaj gekolegoj aŭ gelernantoj, sendu siajn adresojn al la sekretario de TAGE. Oni senpage presigos la adresojn en I. P. R. kun la ordinaraj mallongigoj. Se oni deziras tujan respondon aŭ specimenan ekzempleron de I. P. R., tiam sendu unu resp. kup. La adresoj estos almenaŭ presigataj ses foje jare. Petu pluajn informojn de : K. H. Sportel, Nieuw-Scheemda (G.).

Usono : F.ino Alice H. Lapidge, instruistino de matematiko dez. kor. pri eduk-aferoj kun tutmondo. 103-15, 121 St. Richmond. Hill, N. Y.

Ĉeĥoslavokujo : Neŭtrala Esp. Asocio en Dolni Suchà, aranĝos grandan E.-ekspozicion en junio k. j. Ni petas ĉiujn E.-istojn senpage sendi afiŝojn, gazetojn, broŝurojn, librojn, k.t.p. Ni antaŭdankas. Adr. : Prez. Klimsza Emilo, Dolni Suchà 304, Silezio.

Japanujo : Keniti Hasegawa, Io, 1 Jo, 6 Tyomi, Asahigawa, Hokkaido, dez. interŝ. pm., precipe aerajn, bonfarajn, memorajn, k. ĉ. l., kaj. kor.

Polujo : Pro tro multaj korespondadresoj, ricevataj je mia anonceto, tute ne eblas al mi respondi al ĉiuj. Do mi petas per ĉi tiu vojo pardonon! Prof. M. Sygnarsky, Kordeckiego 23, Bydgoszcz.

ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio)

SKRIBA KURSO POR A KAJ B (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto S. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. „La Verda Stelo”, Scheldestraat 64, Amsterdam-Z.

10 TAGA ESPERANTO-RESTADO EN „RY”, DANLANDO, 31/7-10/8 '38. Plena pensio 35-50 kronoj. = 14-20 guld. Lastjare 160 partoprenantoj el 10 landoj. Senkosta prospekto ĉe H. Grönborg, Risskov, Danlando.

LA 18-a SAT-KONGRESO okazos en Bruselo de 7-13 aŭgusto 1938. Preparu vin por partopreni nian nunjaran tutmondan manifestacion! Adreso sekretario : L. Strainchamps, 148 Av. du Roi, Bruxelles-Forest.

M. E. B. (Muusses-Esp.-Biblioteko) enhavas tiajn verketojn, kiuj interesas ĉiujn esperantistojn! Libretojn pri historio, verketojn el diversaj branĉoj de scienco, kulturo, arto, ktp.; novelojn kaj rakontojn, tradukitajn kaj originajn. Eminentaj samideanoj kunlaboras. Unuopaj numeroj kostas 0,35 guld. Tuta serio de 10 volumetoj kostas 2,50 guld. Por 4,50 guld. oni ricevas la unuan kaj duan seriojn (do 20 volumetojn). Aĉetu ĉi trezoron de internacia legaĵo! Mendu al „La Juna Vivo”.

„PER UNUIGITAJ FORTOJ”, eksterorganiza, sendependa, ĝenerala revuo de la Esp. movado. Aperas monate. Ĉefredaktoro M. Movo, Paris-Vanves, R. Julien 84, Francujo. La revuo informas objektivaj kaj malkaŝe pri la okazintaĵoj kaj problemoj en la esp. movado. Jarabono 2,25 guld.

INTERNACIAJ ESPERANTO-GAZETOJ. Por 0,40 guld. (3 resp. kup.) oni ricevas 10 diversajn ekzemplerojn. Adr. : Red. „La Juna Vivo”.

ANKORAŬ NUN povas al vi utili la „**Esperantista Kalendaro**”, eldonita de Esperanto Asocio de Estonio, Tallin, Postkast 6. Prezo : Por 1 respond-kupono oni ricevas 2 ekz., afr.

VIRINAJ KOLTUKOJ (Jugoslavaj) el silko, triangulaj, kun esperantaj simboloj (amo, paco, frateco). Prezo : 0,68 guld. Grando 80 × 80 × 120 cm. Mendebaj al Red. „La Juna Vivo”.

„**LA JUNA VIVO**”. Por 0,20 guld. oni ricevas 10 malnovajn numerojn de nia revuo, laŭplaĉe samajn aŭ diversajn.

„**NIA GAZETO**”, la plej legata, la plej enhava, la plej malkara, monata, grandformata, ilustrita revuo. Direktoro-ĉefredaktoro : Georges Avril. — Jarabono 0,90 guld. Petu specimenon (prezo 5 c.) al red. „L. J. V.”.

LA 9a KONGRESO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA okazos je la Pentekostotagoj (4-5-6 junio'38) en la mezepoka arturbo **Brugge** (Belgujo). Tre alloga programo. Kotizo : 15 fr. Petu informojn al : „Sekretariejo de l' kongreskomitato, Komvest 79, Brugge.”

„**NIAJ VIZAĜOJ**”, Belaspekta, riĉe ilustrita revuo, eldonata en Jugoslavio. Jarabono 1,20 guld. Abonebla ĉe „La Juna Vivo”.

„**LA JUNA VIVO**”-binditaj jarkolektoj enhavas veran trezoron de internacia legaĵo. Prezo nur 0,65 guld. po ekzemplero.

INTERNACIA KANTARO „LA JUNA VIVO”. Enhavo : 34 kantoj kun muziknotoj. Prezo nur 0,35. Ĉe mendo de pluraj ekz. nur 0,25 guld. Tre rekomendinda por grupvesperoj kaj ekskursoj !

ESPERANTISTA RENKONTIĜO okazos en Luksemburgo, dimanĉon la 26an de junio. Gekamaradoj el aliaj landoj, partoprenu en ĝi ! Ni estos felikaj ricevi multajn aliĝilojn. Petu sciigojn al : Lab. Esp. Grupo, 2, rue Drouin, Nancy, Francujo.

INTERNACIAJ FERIAJ ESP. KURSOJ, 16-24 julio '38 kaj **Internacia Ferio Esp.ista**, 15-25 aŭgusto '38, en la intern. altlernejo, Helsingör, Danl. En 1937 210 personoj el 14 landoj. Prezo nur 19 kaj 22 fl. Ĉiuj E-istoj bonvenaj. Karavano el Nederl., Francujo kaj Anglujo. Prospekto senpage ĉe S.ro L. Friis, Thyrasvej 15, Aabyhöj, Danl.

LUEBLA EN GROET : Meblita, nova domo, piede de la dunoj kaj apud la maro. Adreso : S.ro W. Bant, Lernejestro, Groet (N.H.), Nederlando.

HOLANDAJ ESPERANTISTOJ, kiuj deziras libertempi ĉe francaj samideanoj, kaj reciproke pretas akcepti la gastigantojn, turnu sin al : S.ro H. Micard, instruisto, Epineux-le-Séguin, par Laval-Annexe (Mayenne), Franc.

„**VERDA REVUO**” ne plus aperas. Ĉiuj ĝiaj abonantoj rericevos dum la monatoj majo kaj junio sian abonpagon 1938. Se „Verda Revuo” ne povos sendi monon, ĝi sendos librojn en la sama valoro de la abonpago. „**Verda**

Ĉiu, kiu varbos 2 abonantojn je „La Juna Vivo” donace ricevos la novan kantaron „L. J. V.”.

Revuo tutkore dankas al ĉiuj tutmondaj gesamideanoj ! Nuna adreso : S.ro Scheibenreiter Franz, Wien VII, Hermangasse 31/26, Oesterreich-Deutschland.

„LA JUNA VIVO”-TEATRAĴOJ. La plej efika maniero por paroligi komencantojn estas prezenti teatraĵojn. Multajn laŭdajn leterojn ni ricevis de

„La novaj Vestoj de la Reĝo” (15-20 inf. aŭ plenaĝuloj, triakta).

„La elektraĵoj de la Sinjorino” (3 plenaĝuloj k. 2 inf., unuakta).

„La Naskiĝtago” (8 infanoj, triakta).

„Kion faras la Patrio, tio ĉiam estas bona” (8 plenaĝuloj aŭ inf., unuakta).

„La tro longa Pantalono” (4 plenaĝuloj aŭ infanoj, 2 akta).

Prezo : 0,10 gld. (1 resp. kup. Mendebila ĉe „La Juna Vivo” kaj ĉiuj Esperanto-librejoj.

Kursgvidantoj tuj petu specimenon de „Internacia Lernolibreto” ! Prezo : Ned. : 0,20 gld.; Usono : 0,15 dol.; Britujo : 6 p.; Belgujo : 3 fr.; Francujo : 2,50 fr.; Svisujo : 0,40 sv. fr.; Danujo : 0,50 fr.; Ĉeĥoslovakujo : 3,5 Kĉs.

„Pola Esperantisto” (No 2 '37) : ...Ĝi enhavas 15 lecionojn, kies tekstoj fariĝas laŭgrade pli kaj pli malfacilaj. Imitindan novaĵon formas 9 kantoj kun muziknotoj. La ilustraĵoj estas tre klaraj, kaj el grafika vidpunkto bonege reproduktitaj. La lingvo estas modela, vere Zamenhofa Esperanto, kaj pro tio mi, kiel ortodoksa „fundamentisto” legis la verketon kun granda plezuro.

KUDLAGO, LA MALGRANDA ESKIMO, de N. v. Hichtum. Ideala libreto por junaj esperantistoj. El la rakonto pri la vivado de Kudlago oni ekscias multon pri la vivmaniero kaj la lando de la eskima popolo, kaj oni klare vidas, ke ankaŭ tiu popolo amas sian, por ni mallogan, landon. Prezo 0,45 gld. Mendebila al „La Juna Vivo”.

BILDO D.ro ZAMENHOF, formato 36×28,5 cm., tre bela, prezo 0,60 guld., prezo de poŝtkartformato 0,06 guld. Mendebila al „La Juna Vivo”, West-Grafdijk.

Esperantaj gazetoj, aboneblaj ĉe „La Juna Vivo”.

Nia Gazeto, monata	» f 0,90	Esperanto-Internacia, mon. jara	f 2,50
Scienca Gazeto, dumonata	» f 1,50	Bulteno de I. S. A. E., dumo-	
Heroldo de Esp., semajna...	» f 6,80	nata	» f 1,35
Niaj Vizagoj, monata	» f 1,20	La Praktiko, monata	» f 2,50

Specimenoj : Ni sendas senpage specimenon de „La Juna Vivo”. Specimenojn de aliaj gazetoj ni sendas (se en stoko) kontraŭ 5-cenda poŝtmarko.

La red. de „La Juna Vivo” neniel respondecas pri neregula apero de la supraj gazetoj !

PERANTOJ POR „LA JUNA VIVO”

BELGUJO : H. Rainson, Hombeeksche stw., 54, Mechelen. Ĝironumero 335183.

BRAZILIO : S.ino Maria Cêda de Moraes, Rua 20 de Abril, 16, Rio de Janeiro.

BRITUJO : Brita Esp. Asocio, 142 High Holborn, London W. C. I.

BRITUJO : „Brita Lab. Esp. Asocio”, p/a S.ro Evans, 70 Hide Grove, Manchester 13.

ĈEĤOSLOVAKUJO : Ĉeĥosl. Esp. Asocio, Truhlarska, 16, Praha II. Poŝt-ĉekkonto 12.371.

DANUJO : Dansk Esperanto Institut, Adr. abonejo : S.ro C. Jensen, Musikhuset, Nykøbing F.

ESTONIO : Esperanto Asocio de Estonio, Tallin. Poŝtkast 6.

FRANCUJO : F.ino J. Lepachelet, 13 Place Victor Hugo, Somain (Nord). Ĝironumero : Lille 72.36.

JUGOSLAVUJO : P. Golobič, Instruisto, Jesenice-Fuzine.

ESTONIO : Esperanto Asocio de Estonio, Tallin, Poŝtkast 6.

LATVUJO : F.ino Ludm. Jevsejeva, Riga, Reformatoru, iela 14, dz. 5.

MAROKO : S.ino Irène Fink, 41 Bd. Moulay Jousef, Casablanca.

NORVEGUJO : Norvega Esp. Ligo, p/a S.ro G. Johannessen, Skappels-gate, 5, Hamar.

POLUJO : Prof. Sygnarski, Kordeckiego 23, Budgoszcz.

SVEDUJO : Sveda Lab. Esp. Asocio, Barnhusgatan 8, Stokholm.

SVEDUJO : Eldona Societo Esper., Stokholm I, Box 698. Ĝironumero 578.

SVISUJO : R. A. Dasen, 19a avenue Riant-Parc, Genève. Ĝironumero 16256.

USONO : Amerika Esp. Instituto, 1111 Brooke Road, Illinois.

HEROLDO DE ESPERANTO

La semajna organo de la
Esperanto-movado

„Mia plej regula kaj plej ŝata
„gasto...” — „Mia fidela amiko, kiun
mi ne volus malhavi...” — „La ĉefa
fonto, el kiu mi ĉerpas ĉiam novan
entuziasmon kaj fervoron por nia
movado...” — „Mian saluton al He-
roldo, kiu estas ĉiusemajna sunradio
en malpaca kaj malbona epoko...”

TIEL SKRIBAS AL NI NIAJ
LEGANTOJ KAJ AMIKOJ !

HEROLDO DE ESPERANTO

Scheveningen (Nederlando)

JARKOTIZO POR 1937/1938.

Argentino : 2 pes.; Aŭstrio : 3,20 ŝil.;
Begujo : 14 fr.; Ĉeĥoslovakujo : 17 Kĉs.;
Ĉinujo : 2 dol.; Danujo : 2,50 kr.; Esto-
nio 2,50 kr.; Finnlando : 25 finn. Mk.;
Francujo : 15 fr.; Japanujo : 2 jen; Ita-
lujo : 10 l.; Jugoslavio : 25 din.; Nor-
vegujo : 2,50 kr.; Polujo : 3,20 zl.;
Svedujo : 2,20 kr.; Svisujo : 2,10 fr.;
Usono : 0,60 dol.

UNUIĜO POR FREMULTRAFIKO

La venonta internacia junularkunveno

SENPAGAJN INFORMOJN

PRI RESTADO KTP.

ONI PETU AL :

V. V. V. „GROET-KAMPERDUIN”

Post Groet (N. H.)

TEL. 423

Presejo A. Hessens, Bruselo.